



HISTORIO

Decida batalo

LITOVIO

Ŝarko-ŝoko


**Ĉu biokarburadoj
helpas aŭ malhelpas?**



Aperis du noveloj de la afrika aŭtoro Jean Codjo:



La paŝo senelirejen: La unua verko de Jean Codjo, kiu rakontas la unuan kontakton de sia vilaĝo kun la okcidentaj kulturigontoj ... Neteoria trakto, tamen tre inspira!



Dialogo inter surduloj: Dua verko de la benina aŭtoro, pri la malfacileco de komunikado inter kulturoj. Civilizita nigra blankulo prelegas, sub la baobabo, al siaj samtribanoj. Ili aŭskultas sed ne aŭdas ...

Prezo: po 6 eŭroj + afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendisto.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

La „saĝeco” de Sócrates

8

Maltrankviliĝis portugaloj pro polica agado kontraŭ manifestaciintoj kaj sindikatanoj. La agado pensigis pri la situacio en la tempo de faŝismo. Malkontento ĝeneralas, ĉefe pro politikoj pri sano, klerigo kaj maldungo.



Decida batalo

11

Ĉi-jare okazis la 300a datreveno de la batalo de Almansa, kie la dinastioj de la Burbonoj kaj la Habsburgoj luktis por akiri la hispanajn reĝlandojn. Sekvis longa milito, kiun historiistoj taksas la unua eŭropa milito de la moderna epoko. Anglio retenis Ĝibraltaron kaj Minorkon kaj ĉefe monopolon pri amerika sklavo-komercado. Pleje perdis tamen Aragono, Valencio, Majorko kaj Katalunio, ekde tiam ĝis la nuno estas regataj de fremdaj leĝaroj. Do daŭre sentebles la postefikoj de batalo okazinta antaŭ 300 jaroj.



Ŝarko-ŝoko

13

Ankaŭ ŝarko en akvario povas esti danĝera. Tion konstatis la zoologo kaj subakvisto Tadas Laurinavičius, kiu zorgas pri akvariaj vivuloj en komerca centro en la litova urbo Kaunas.



Ĉu biokarburajoj helpas aŭ malhelpas?

16

Nuntempe oni ĝenerale akceptas, ke la energikonsumo endanĝerigas nian socion. Unuflanke la kutimaj, facile trovblaj kaj uzablaj energifontoj iom post iom elĉerpiĝas. Aliflanke la daŭra grandskala uzo de energio influos (kaj eble jam influas) la klimaton. Bonaj solvoj maloftas.



FOTO DE LA KOVRILLO: MZELLE BISCOTTE

POLITIKO

Portugalo..... 8

La „saĝeco” de Sócrates

Hungario..... 9

Nubo super Danubo

Kosovo 10

Arestita - pro memdecido

Azilo 10

„Revenigu mian familion”

MODERNA VIVO

Historio 11

Decida Batalo

Nacia Tago 12

Litovio 13

Ŝarko-ŝoko

Vito-kultivado 14

Je via sano!

Eseo 15

Batila batalo

EKONOMIO

Energio 16

Ĉu biokarburajoj helpas aŭ malhelpas

Statistiko 18

Averaĝa litovo

Ĉinio..... 19

Registaro asertas, ke manĝaĵoj estas sekuraj

TURISMO

Finnlando 20

Nanoq - la unua arkta muzeo

ARTO

Literaturo 21

Nekonata genio

La movada koro sur viddisko 22

LIBROJ

Sukcesoplana, ŝercoplana kaj tre malkutima 23

Pri edukado de geniuloj 24

SPIRITA VIVO

Mirakla preĝeja incendio 25

NOVELO

Karulino kanibalino 26

Abonoj 4

Enkonduko 5

Leteroj 6

El mia ridpunkto 7

Anoncetoj 27

Kiel pagi vian abonon de MONATO?

► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je **belga** banko en **eŭroj**. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	23	27	13,8	5	9
Aŭstralio	AUD	82	90	49,2	9	17
Aŭstrio	EUR	49	53	27,6	5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5	9
Brazilo	EUR	23	27	13,8	5	9
Britio	GBP	34	37	20,4	4	6,5
Bulgario	EUR	25	29	15	5	9
Ĉeĥio	EUR	33	37	19,8	5	9
Danio	DKK	365	395	219	40	70
Estonio	EUR	25	29	15	5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5	9
Germanio (or.)	EUR	45	49	27	5	9
Grekio	EUR	45	49	27	5	9
Hispanio	EUR	45	49	27	5	9
Honkongo	EUR	41	45	24,6	5	9
Hungario	EUR	25	29	15	5	9
Irlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5	9
Israelo	EUR	41	45	24,6	5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5	9
Japanio	JPY	7900	8500	4740	860	1460
Kanado	CAD	73	78	43,8	9	15
Kipro	EUR	33	37	19,8	5	9
Koreio	EUR	41	45	24,6	5	9
Kostariko	EUR	23	27	13,8	5	9
Kroatio	EUR	25	29	15	5	9
Latvio	EUR	25	29	15	5	9
Litovio	EUR	25	29	15	5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5	9
Malto	EUR	33	37	19,8	5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5	9
Norvegio	NOK	390	430	234	45	71
Nov-Zelando	NZD	95	103	57	10	18
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22	36
Portugallio	EUR	41	45	24,6	5	9
Rusio	EUR	23	27	13,8	5	9
Singapuro	EUR	41	45	24,6	5	9
Slovakio	EUR	25	29	15	5	9
Slovenio	EUR	33	37	19,8	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	45	24,6	5	9
Svedio	SEK	460	495	276	49	84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	15
Tajvano	EUR	41	45	24,6	5	9
Usono	USD	69	75	41,4	8	13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5	9

Prezo de la retaj versioj (askia, unikoda aŭ PDF): 60% de la surfaca tarifo.

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasília. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelso, 5 Craighill Road, Kilmadzw, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davidekelso@yahoo.co.uk.
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto MONATO: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi.
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceraise, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo.ESPERO@t-online.de.
 - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de.
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japania:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolsenskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miamiau1@ice.co.cr.
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
- **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu.
- **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
 - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm-mail.telia.com.
 - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org.

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 28a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵ artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopio: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonctarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Nota:** Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net..
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Sherco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Problemoj ne solvataj



La finiĝantan jaron karakterizis tutmonde multaj gravaj problemoj, kiujn oni ne solvis kaj tre probable ankaŭ ne solvos venontjare. Ni menciuj nur la militojn en Irako kaj Afganio, kiuj nun daŭras jam multajn jarojn sen perspektivo pri finiĝo. Tie kaj en multaj aliaj regionoj islamista terorismo ĉiutage voras centojn da homoj kaj neniu ĝis nun trovis efikan rimedon kontraŭ tiu skurĝo de la koncernataj popoloj. Simile ne estas imageble, ke baldaŭ estos solveblaj aliaj sangaj konfliktoj, ekzemple en Palestino, Libano, Pakistano, Birmo kaj Sudano. Kio finfine okazos en Kosovo, neniu povas prognozi, sendepende ĉu la regiono iĝos aŭtonoma aŭ ne.

Alia konflikto eliras de Irano, kiu laŭ aserto de (precipe) Usono strebas produkti atombombojn. Pro tio Usono planas kontraŭraketa sistemon, kio agacas Rusion. Ties prezidanto Putin anoncis modernigon de la rusa armeo kaj konstruadon de novaj raketoj – timoj pri nova vetarmado ekestis. Elirvojo por tiu konflikto ĝis nun ne estas videbla. En Rusio mem subpremo de opozicio kaj demokratiaj fortoj daŭras. Simile en Ĉinio la reĝimo daŭre tretas homajn rajtojn. Poluado de medio tie krome atingis terurajn dimensiojn. Sed ankaŭ ĝenerale la medio konstante suferas, precipe pro sekvoj de klimata ŝanĝo. Ankaŭ tiun gigantan problemon oni ne solvis kaj certe ne solvos, tiel ke ni ĉiuj devas adaptiĝi al tute novaj vivcirconstancoj. Sed kiel adaptiĝu homoj en multaj tre malriĉaj landoj de Afriko, kiujn aparte trafas la sekvoj de klimata ŝanĝo? Ili eĉ pli amase ol ĝis nun mortas pro malsato kaj manko de pura akvo.

Vere, ni ne havas kialojn por rigardi kun optimismo al la nova jaro. Ni devos vivi kun tiuj konstantaj konfliktoj kaj la timoj, kiujn ili kaŭzas. Dume daŭre bonfartas kapitalistoj, kies profitoj kreskas spite al aŭ parte eĉ pro kaj per tiuj konfliktoj kaj problemoj. Mi ne estas kapitalisto, kaj supozeble ankaŭ inter niaj legantoj ni ne trovas tiun specion de riĉuloj.

Sincere via

Stefan MAUL

Ĉu Flandrio kaj Valonio divorcu?



En la artikolo pri Belgio (MONATO 2007/11, p. 8-10) mankas kelkaj argumentoj. Iuj demandas, ĉu Flandrio povus aldoniĝi al Nederlando kaj Valonio al Francio por pligrandigi tiujn landojn per samlingvaj regionoj. Mi kredas, ke flandroj en multaj aspektoj diferencas de nederlandanoj kaj valonoj ne tro similas al francoj. Tamen indas menci tiu, kio flandrojn kaj valonojn kunligas: bonaj bieroj, fritoj, bona kuirarto, simple iu certa burgunda vivoĝojo, malfacile difinebla, sed vere komuna.

La demando, ĉu Belgio vere bezonas reĝon aŭ ne, laŭ mi ne tiom gravas kaj certe ne nun, kiam oni volas pli kaj pli limigi la veran povon de la reĝo.

Ni konstatas dum la lastaj jardekoj pli da fortoj disigaj ol kunigaj. La unueco de Belgio malfortiĝas pro tio, ke en la decidonivelo estiĝas pli kaj pli da eŭropa partopreno, kaj ĉar oni atribuas al la regionoj pli grandan povon. La vere federacia belga nivelo malfortiĝas do de du flankoj.

Oni povus plifortigi Belgion per kulturaj ligiloj. Mi proponas pli da renkontiĝoj inter flandraj kaj valonaj kulturaj grupoj por tiel plifortigi la komunan senton de aparteno al ŝtato, kiu nun havas tro grandajn kontrastojn.

Eddy VAN DEN BOSCH
Belgio

Ĉu Flandrio kaj Valonio divorcu? (2)

La metodo intervui civitanojn el la diversaj partoj de Belgio (MONATO 2007/11, p. 8-10) ŝajnas al mi tute taŭga kaj donas kalejdoskopon de almenaŭ dek du opinioj. Tio permesas al la legantoj dise tra la mondo pli bone kompreni la belgan problemaron, kiu estas ofte misprezentita de alilandaj informfontoj, ĉefe en Francio, kvankam najbarlando (aŭ eble pro tio).

Mi volus tamen substreki faktoron, kiun neniu intervjuito menciis: La daŭra miskompreno inter franc- kaj nederlandlingvanoj en Belgio fontas ankaŭ el du apartaj logikaj sistemoj: La nederlandlingva komunumo konsideras, ke pli gravas la *teritoria rajto*, kaj ke do la situacio de la lingvolimo (ĉefe ĉirkaŭ Bruselo) ne estas ŝanĝebla, eĉ se okazus ŝanĝo de plimulto en iuj municipoj. Male la francilingvanoj ĝenerale asertas, ke plej gravas la *individua rajto*, kaj ke do la limo, ekzemple de la dulingva regiono Bruselo, estas ŝanĝebla. Sidanta inter du seĝoj, mi volus pravigi nek la unuan, nek la duan starpunkton.

Tamen mi certas, ke civitanoj de aliaj plurlingvaj ŝtatoj, ekzemple Svislando (kiu ja estas konfederacio) apenaŭ povas kompreni, ke tiu problemaro ne estas solvebla laŭ objektivaj kriterioj en nia malfeliĉa reĝlando.

Marc DEMONTY
Belgio

Kial pastroj ne edziĝu?

Armando Zecchin (MONATO 2007/10, p. 17) supraĵe aludas al la „honta afero de la pederastaj pastroj” de la romkatolika eklezio en Usono. Sed skandaloj okazas ne nur en Usono. Kaj temas ne nur pri „pederastio”, sed ankaŭ pri alia seksa aktiveco de la pastroj. La eklezio en di-

versaj landoj devas pagi grandajn sumojn por kompensi al virinoj, kiuj naskas la bebojn de pastroj. Kial grandskale okazas tia seksa aberacio inter pastroj? La kialo estas memklara, kaj la problemon povas solvi la papo, kiu estas la lasta aŭtokrato kaj regas la eklezion, la Sanktan Diocezon kaj Vatikanon. Li devus nuligi la devigon pri seksabstino. Ekzistas neniu kialo, nek en la Biblio, nek aliloke. Pastro estas viro, kiu havas naturan seksimpulson. Kial la papo ne permesas al pastroj edziĝi, kiel en la protestantaj konfesioj? Tiu reformo ne nur evitigus, ke pastroj „krimas”, sed igus ilin kapablaj pli bone konsili kaj helpi siajn paroĥanojn.

W. H. SIMCOCK
Britio

Honesta priskribo

La dika Krause? ... kredu min, sinjorino! (MONATO 2007/10, p. 23): jen vere interese honesta priskribo de la *Granda Vortaro Germana-Esperanto* de Erich-Dieter Krause. Dankon, sinjoro Desmet’!

Albert WICKLER
Luksemburgo



Kial korekti la ĝustan formon?

En la artikolo *Pace vivi, pace morti* (MONATO 2007/11, p. 15) mi menciis „Eŭskion”, kaj surprizis min, ke la redaktoro ŝanĝis la nomon de la lando al „Vaskio”. En la enkonduko de la sama numero Stefan Maul asertas, ke la redakcio de MONATO sekvas la principon, ke la loĝantoj de lando rajtas mem decidi, kiel ili nomas ĝin. Laŭ tiu principo, se eŭskoj nomas sian landon Eŭskio, kial la redaktoro prenis la hispanlingvan radikon?

Ferriol MACIP I BONET
Katalunio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Du mil sep

de Stefan MAUL

Unu el la plej kuriozaj informoj ĉi-jare venis el Britio: registara komisiono konsultante konstatis, ke ĉiu dua brito estas tro dika. Ĉu vere? Mi ne konas dikajn britojn; eĉ ĉiuj anoj de la reĝa familio, kiu certe fartas bone, estas sveltaj. Sed sanministro Alan Johnson [ĝonzn] aserte avertis, ke la dikokrizo egalas al la danĝero, kiu minacas per la klimatsanĝo. Tial nun britoj rezignu pri freŝa lakto, por tiel savi sin mem kaj la planedon. Ĉar fridujoj por konservi freŝan lakton poluas la medion. Eĉ pli kurioza estas alia postulo registara: oni devas redukti la metan-emision de bovinoj je 60 %, alivorte: bovinoj favore al klimato furzu malpli. Kiel la registaro volas certigi tion, oni ne diris – eble per kataliziloj en anuso? En aŭtoj tio ja funkcias ...

Aserti kaj pruvi

Kurioza estis ankaŭ aserto de la prezidanto de Usono, kiu – kiel konate – estas inter la plej poluantaj landoj. Buŝo elbuŝigis: „Ĉu estas konate al vi, ke Usono estas la sola grava industri-nacio, kiu pasintjare reduktis siajn forcejgasejojn?” Fakte la energi-ministrejo konstatis malkreskon de karbondioksido je 1,3 % kompare al 2006. Sed dum la regado de Buŝo en antaŭaj jaroj emisiado de tiu veneno konstante kreskis. Mokis Daniel Weiss [vajs] de Centro por Usona Progreso: „Tio sonas kvazaŭ iu diras, ke li malpeziĝis je tri funtoj, post kiam antaŭe li aldonis 25 funtojn.” La ministrejo konfese koncedis, ke manke de kompareblaj donitaĵoj el aliaj landoj oni ne povas pruvi la laŭtan memlaŭdon de Buŝo.

Jes, aserti kaj pruvi estas du diversaj aferoj. Tion spertis ankaŭ Irano, kiu en marto kaptis britajn soldatojn antaŭ sia marbordo, asertante ke tio okazis en irana marparto. Britoj tamen per satelitaj

mezuroj (kiuj precizas je 30 m) pruvis, ke estis internacia maro. Kontraŭe Irano prezentis mapon pri la loko de la kaptaĵo – sed iranironie, estis iraka marparto ... Alian frenezan aserton faris usona juĝisto, kiu postulis de purigejo pagon de milionoj da dolaroj pro malapero de lia pantalono, i. a. pro emocia doloro pri la perdo. Post dujara proceso montriĝis, ke la juĝisto eĉ ne povis pruvi, ke malaperis la pantalono. Plia strangaĵo en la lando de senlimaj kuriozaĵoj estas, ke urbestraro de Belmonto malpermesis fumadon en privataj hejmoj, se temas pri domo kun pluraj loĝejoj. Fumantoj fuĝas nun amase el tiaj domoj al belmontoj.

Ĉu vi konas piresojn?


Kuriozaj estas ankaŭ hungaroj. En du opini-sondoj ili postulis, malpermesi enmigradon de piresoj; se vi ne konas tiun etnon, ne miru: ĝi estas fantaziaĵo de opinisonda instituto Tarki. Post unua pridemandado en junio 2006, kiam 68 % kontraŭis piresojn, oni sondis la aferon denove en februaro 2007; plora esplor-rezulto estis, ke rifuzo kreskis je pliaj 9 %. Kompatindaj piresoj – aŭ kompatindaj hungaroj? Malamo de fremduloj ekzistas en multaj landoj, ankaŭ en Pollando, kie

ĉefministro Jaroslav Kaĉinski agitadis kontraŭ germanoj. Bedaŭrinde li nun devas fari tion en opozicio, ĉar dum elektoj en oktobro la pola popolo voĉdonis plimulte por aliaj, tiel ke Kaĉinski kun sia partio PiS forpisis sin el la registaro.

Ruza ruso

Tion ne devos fari rusa prezidanto Vladimir Putin. Respektante la konstitucion, kiu malpermesas al li plian oficperiodon, li nun kandidatos por posteno de ĉefministro kaj do daŭre povos diktatori en sia „lupe-pura demokratio” (laŭ karakterizo fare de eksa germana kanceliero Gerhard Ŝreder, kiu vere diris „lupepura” ne „lupe pura”). Ĉar kompreneble la nova prezidanto devos obei ordonojn de Putin kaj, kiel oni supozas, baldaŭ rezignos pri sia ofico, ekz. pro malsano. Tiam Putin, respektante la konstitucion, denove povos fariĝi prezidanto. Eleganta rusa kaj ruza solvo, ĉu ne?

Post tiom da negativaj kuriozaĵoj de 2007 ni volas fine mencii almenaŭ unu spritan. Trinkaĵ-produktisto en Santiago-de-Ĉilio varbis per jena slogano: „Ok-dektriprocenta fumnebul, centprocenta oranĝosuko”. Dum ni do havas purajn sukojn, ni trankvile povas atendi la venontan fumnebul-alarmon. ■



ERIC DRAPER

PORTUGALIO

La „saĝeco” de Sócrates



MIGUEL A. LOPES

Ordonemaj ideoj rapide disvastiĝas sub la registaro de José Sócrates, ĉefministro de Portugalio ekde 2005.

Maltrankviliĝis portugaloj pro polica agado kontraŭ manifestaciintoj kaj sindikatoj. Komence de oktobro policianoj vizitis manifestaciintojn en la sud-portugala urbeto Montemor-o-Novo [montemór-u-nóvu] kaj, samtage, membrojn de instruista sindikato en la mezlanda urbo Covilhã [kuvilján].

La agado pensigis ne nur pri la nuna stato de demokratio en Portugalio, sed ankaŭ pri la situacio en 1974, en la tempo de faŝismo. Sed kontraste al la spirito de la t.n. aprilistoj (t.e. la revolucioj de aprilo 1974), ordonemaj ideoj rapide disvastiĝas sub la registra-

ro de José Sócrates, ĉefministro ekde 2005.

Kontraŭ Sócrates protestis la 9an de oktobro pli ol cent homoj, kiuj koncentriĝis ĉe lernejo en Covilhã. Tial la polico vizitis la sidejon de la tiea instruista sindikato kaj forprenis dokumentojn kaj flugfoliojn. Politikistoj de ĉiuj partioj petis klarigon, kaj la registaro diris, ke la vizito rutinas kaj ne plu okazos. Tamen la popolo miris, ke polica vizito al sindikato fariĝas „rutina” en demokratia ŝtato.

Ekspluatado

Persekutataj estas instruistoj kaj ilia sindikato, ĉar ili apartenas al unu el la politike plej konsciaj sociaj klasoj. Konsciaj, ĉar kelkaj instruistoj, iufoje grave malsanaj, devas labori ĝis la morto: ne permesas ilin emeriti la socia asekuro. Temas ne nur pri ekspluatado de la instruistoj, sed ankaŭ pri vera abomeno. Tiun abomenon la ministrino pri klerigado, Maria de Lurdes Rodrigues [rudrigues], apenaŭ kapablis kaŝi antaŭ televidaj kameraoj, kiam ŝi enposteniĝis.

Antaŭ nelonge Sócrates estis prifafita en la insulo Madejro, samkiel en la urboj Évora [évura] kaj Coimbra [kuimbura]. Malkontento ĝeneralas, ĉefe pro politikoj pri sano, klerigo kaj maldungo. La estraro akuzas la Komunistan Partion, dirante, ke kulpas komunistoj pro la manifestacioj. Antaŭ la revolucio la Komunista Partio estis akuzita pro ĉio malbona en Portugalio. Eble ripetas sin la historio.

João José SANTOS

Tiu karnavala ĉaro temas pri la falsaj promesoj de Sócrates.



CLAUDIO FRANCO

Nubo super Danubo

La rivero Danubo en la limo inter Slovakio kaj Hungario.

Ŝajnas, ke ne eblas bonaj, „amikaj” rilatoj inter la du najbaraj landoj Slovakio kaj Hungario. Komence venenis la rilatojn la elektrocentralo sur la rivero Danubo: slovakoj, malgraŭ hungaraj protestoj, deflankigis la riveron por produkti elektron. Pasintjare hungara slovakino estis surstrate batita. Ankoraŭ daŭras enketoj, kaj la afero iĝis politika. Laŭ la fraŭlino, la atako okazis, ĉar ŝi parolis hungare. Tion slovakoj ne kredas.

Intertempe, en la slovaka parlamento la Partio de Hungara Koalicio prezentis leĝo-proponon por kompensi al hungaroj, kiuj suferis pro la t.n. dekretoj de Beneš. Edvard Beneš estis ĉefministro de Ĉeĥoslovakio dum la dua mondmilito. Li estris en Londono ekzilan kabineton por la tiam ne plu ekzistanta Ĉeĥoslovakio. Laŭ la dekretoj, la hungara minoritato komu-

ne kaj unuece kulpas pri la faŝismo kaj pri la nuligo de Ĉeĥoslovakio.

Forpelitaj

Rezulte perdis hungaroj sian ŝtatanecon, ili ne ricevis pensiojn kaj ne povis lerni en universitatoj. Iliaj havaĵoj estis forprenitaj, la hungara lingvo estis malpermesita, malaperis hungarlingvaj eldonoj, malfonditaj estis hungaraj kulturaj kaj sociaj institutoj, kaj, fine, almenaŭ kelkaj hungaroj estis forpelitaj. Beneš efektive „purigis” la landon, sengermanigante Ĉeĥion kaj senhungarigante Slovakion.

La leĝo-propono, prezentita en la nomo de la hungara minoritato, estas rifuzita de slovakaj parlamentanoj. Politikistoj unuvoĉe deklaris, ke la dekretoj de Beneš estas netuŝeblaj. Tamen ili kondamnis ĝenerale la nocion pri



Laŭ la dekretoj de Edvard Beneš, ĉefministro de Ĉeĥoslovakio dum la dua mondmilito, la hungara minoritato komune kaj unuece kulpas pri la faŝismo kaj pri la nuligo de Ĉeĥoslovakio. Rezulte perdis hungaroj sian ŝtatanecon kaj civilajn rajtojn.

komuna kulpo. Sekvis en Hungario nekutime forta protesto kontraŭ la decido de la slovakaj parlamentanoj. Verŝajne la disputo daŭros kadre de Eŭropa Unio.

Karlo JUHÁSZ

KOSOVO

Arestita – pro memdecido

Rezistado – mia dua plej amata vorto.” Tion deklaris Albin Kurti, la estro de la movado *Memdecido*, kiu strebas solvi la problemon pri la statuso de Kosovo per popola referendumo. *Memdecido* estas vera opozicio en Kosovo, kiu kontraŭas ajnan kondiĉitan, kripligitan sendependecon de tiu aŭtonoma regiono de eksa Jugoslavio. Kosovo, pli ol naŭ-dekone loĝata de etnaj aŭtoktonaj albanoj, estis aneksita de la unua Jugoslavio en 1913, maldanke al tiamaj ŝtatpotencoj, ĉefe Francio kaj Rusio.

Kurti aĝas 32 jarojn. Li laboris en la oficejo de Adem Demaçi, laŭreato de la Saĥarov-premio. En 2000 li estis

akuzita pri terorismo kaj enprizonigita en Serbio. Antaŭ juĝejo en Niš li diris, ke li ne sentas sin devigata respondi en juĝejo fremdlanda. Liberiĝinte, danke al premo de internacia komunumo, li tuj sin engaĝis en rekonstruadon de demokratiaj institucioj en Kosovo.

Li prezidis la tiel nomatan Komitaton de Kosova Agado, subtenatan de okcidentlandaj reprezentantoj en Priština. La komitato esploris mankojn kaj atingojn en Kosovo rilate revigligon de la ekonomio, respekton pri minoritatoj kaj demokratiigon de la vivo.

Tragika

Antaŭ kelkaj jaroj Kurti fondis la movadon *Memdecido*, kiu kontraŭas pla-

nojn pri la tiel nomata religia eksterteritorieco, kiu fakte plu tenas Kosovon en Serbio. Dum manifestacio en februaro, kiu finiĝis tragike (mortis du junuloj kaj grave vundiĝis pli ol 80 aliaj), la polico arestis lin. Ekde tiam Kurti plu restas en antaŭprizono, akuzite pri „malrespekto kaj perfortemo al ŝtataj institucioj”.

Kurti fariĝis simbolo de nuntempa popola rezisto en Kosovo. Dum juĝsesio en julio li diris al la internacia prokurorino Cecilia Tillada, kiu akuzis lin pri „alvoko al rezistado”, ke „la vorto rezistado estas la dua plej amata vorto por mi, ĉar, se estas io antaŭen movinta la homaron dum la historio, tio estas ĝuste rezistado kaj alvoko al ĝi”.

Bardhyl Selimi



AZILO

„Revenigu mian familion ...”

Skuiĝis Aŭstrio pro 15-jaraĝa albana knabino. Arigona Zogaj loĝas dum kvin jaroj en centra parto de Aŭstrio kun sia sepmembra familio. La patro laboris kaj la kvin gefiloj studis ĉe aŭstra lernejo. Ili esperis akiri restadpermeson en Aŭstrio.

Sed la ministrejo pri internaj aferoj, konforme al novaj reguloj por forigi eksterlandanojn enmigrintajn pro ekonomiaj kialoj, ordonis, ke estu ellandigita la familio Zogaj. Arigona, sciigite de samklasano pri la ĉeesto de policistoj en sia hejmo, tuj kaŝis sin ĉe amikoj. Tial, dum ŝiaj familianoj estas ĉiuj deportitaj, ŝi restis en Aŭstrio, trovante rifuĝejon ĉe pastro en vilaĝo Ungenach.

Arigona diskonigis vidbendon, en kiu ŝi minacis sin mortigi, se oni ne revenigos la familion en Aŭstrion. En flua germana lingvo, ŝi diris, ke ŝi apenaŭ parolas la albanan, studinte en aŭstra lernejo. Cetere ŝi diris, ke ŝi ankoraŭ memoras la eventojn en Kosovo en 1998-1999.

La aŭstra prezidanto, Heinz Fischer, reagante al protestoj de bonfaraj organizaĵoj kaj ĵurnalistoj, proponis, ke la ministrejo pri internaj aferoj reviziu siajn regulojn almenaŭ por homoj jam integriĝintaj en la lando. En Aŭstrio solvendas 34 000 kazoj pri azildemandoj.

Bardhyl SELIMI

Decida batalo

RICARDO BALAGA

Ĉi-jare okazis la 300a datreveno de la batalo de Almansa, kie la dinastioj de la Burbonoj kaj la Habsburgoj luktis por akiri la hispanajn reĝlandojn.

La habsburga Karolo la 2a mortis senfila en 1700. La tiamaj eŭropaj potencoj disputis, kiu el ili akiris la hispanan monarkion, kiu posedos teritoriojn i.a. en Nederlando kaj Italio. Sekvis longa milito, kiun historiistoj taksas

la unua eŭropa milito de la moderna epoko.

En 1707 trupoj de la burbona kandidato por la hispana trono Filipo la 5a de Kastilio venkis ĉe Almansa kaj eniris la reĝlandon Valencio. Fine, en 1713,

La milito pri la hispana monarkio koncernis, rekte aŭ malrekte, plimulton el eŭropaj regnoj kaj ties respektivaj kolonioj tra la tuta mondo.



La portreto de la reĝo Filipo la 5a troviĝas pendigita inverse en muzeo de la valencia urbo Xàtiva [ŝátiva] memore al la detruo de la urbo per la trupoj de la reĝo la jaron 1707





Daŭre sentebblas la postefikoj de batalo okazinta antaŭ 300 jaroj

per la traktato de Utreĥto, la venkintoj ĉion inter si dividis. Filipo la 5a fariĝis la reĝo de Hispanio kaj de la hispanaj posedaĵoj en Ameriko. Aliaj eŭropaj teritorioj restis tamen por la habsburga kandidato.

Anglio retenis Ĝibraltaron kaj Minorkon kaj ĉefe monopolon pri amerika sklavo-komercado. Pleje perdis tamen la reĝlandoj Aragono, Valencio, Majorco kaj la princlando Katalunio, kies leĝaroj estis nuligitaj kaj kiuj ekde tiam ĝis la nuno estas regataj de fremdaj leĝaroj. Do daŭre sentebblas la postefikoj de batalo okazinta antaŭ 300 jaroj.

Xavier MARGAIS | BASI



Nacia tago

La 11an de septembro, en la nacia tago de Katalunio, oni memoras la malvenkon de Barcelono post kelkmonata sieĝo en la jaro 1714. Post la traktato de Utreĥto la princlando Katalunio decidis rezisti la burbonajn trupojn, sed vane. Do la kataluna popolo celebras sian nacian tagon por ne forgesi la perdon de sia suvereneco, la nuligon de siaj institucioj kaj civitanaj

liberoj kaj la persekutadon de sia kataluna lingvo.

Dum la nacia tago ĉefaj societoj kaj politikaj partioj alportas florojn al la monumento de Rafael de Casanova (1660-1743), la tiama ĉefministro de Barcelono; aliaj same ornamas la monumenton de Josep Moragues i Mas (1669-1715), tiama generalo defendinta Katalunion kaj poste ekzekutita.

Ankaŭ organizaĵoj favoraj al resendependeco de Katalunio aranĝas omaĝojn kaj prelegojn ĉe la amastombejo de la defendintoj de la urbo. Okazas ankaŭ manifestacioj kaj koncertoj.

Ferriol MACIP | BONET



LITOVIO

Ŝarko-ŝoko

Ankaŭ ŝarko en akvario povas esti danĝera. Tion konstatis la zoologo kaj subakvisto Tadas Laurinavičius, kiu zorgas pri akvariaj vivuloj en komerca centro en la litova urbo Kaunas. Li rimarkis, ke unu el la ŝarkoj malvigle naĝas, kaj suspektis, ke la besto malsanas.

La viro decidis eltiri la malsanan ŝarkon kaj transdoni ĝin al spertuloj por plia testado. Tial li plonĝis en la akvarion. „Mi intencis permane kapti la ŝarkon”, li diris. „Tamen ĝi elfuĝis el miaj manoj kaj ektuŝis mian frunton per siaj dentoj. Feliĉe, mia nazo restis surloke.”

La zoologo ne estas grave vundita kaj povis hejme resaniĝi. La 10 m alta akvario, kie li laboras, enhavas pli ol 800 tropikajn fiŝojn, inkluzive de ses ŝarkoj.

LAST

*Ŝarko restas ŝarko –
ĉu en maro, ĉu en akvario.*





VITO-KULTIVADO

La ĉaroj estas gaje ornamitaj.

Je via sano!

En Hungario vino havas tradicion kaj feston. Aparte gravas la rikolto-festo, kiu indikas finon ne nur de la rikolto, sed ankaŭ de la peza agrikultura laboro. Kampanoj estas liberigitaj de devoj kaj zorgoj; samtem-

pe ili gaje anticipas la konsumotan vinon, kiu devas esti fortrinkita por liberiĝi ankaŭ la barelojn.

La festo okazas kutime fine de septembro, komence de oktobro. Tamen iuloke, ekzemple okcidente de la toka-

Dancado signifas la finon de peza laborperiodo ... kaj la komencon de eble dumviva amikeco.



ja regiono, aperas t.n. neĝvino: la beroj estas rikoltataj, nur kiam la unua frosto aŭ la unuaj neĝeroj ilin blankigas.

Festoj okazas preskaŭ tra la tuta lando. Ili komenciĝas per parado de ĉaroj kaj ĉevaloj. La ĉaroj estas ornamitaj per floroj kaj per grapoloj. Festantoj surmetas naciajn vestaĵojn (se ili estas haveblaj); ornamitaj estas ankaŭ la ĉevaloj. Akompanas la ĉarojn muziko kaj kantado; de sur la ĉaroj oni proponas vinon, el bareloj aŭ kruĉoj. Fojfoje la veturantoj trinkas rekte el boteloj.

Vestaĵoj

Portas la virinoj iuloke longan, buntan jupon kun unukolora, sed brodita kitelo; aliloke iom malpli longan, ĝisgenuan jupon kun almenaŭ deko da subjupoj. La kapornamaĵoj montras la familian staton de la virinoj: ĉu fraŭlino, ĉu edzino. La viroj vestas sin pli diskrete per blanka ĉemizo kun blanka aŭ jam pli ofte nigra pantalone kaj botoj.

La rikolta balo pli frue estis grava evento: ne nur la komenco de pli trankvila, malpli labordona periodo, sed ankaŭ okazo por danci, interkonatiĝi, amindumi kaj plifirmigi amrilatojn. Nuntempe oni dancas longe, eble ĝis mateniĝo.

Renomaj

Hungaraj vinoj estas konataj ekster sia propra lando. Renomaj estas ekzemple la vinoj de Badacsony [badaĉonj] pro *Szürkebarát* (Griza Monaĥo) kaj *Kéknyelű* (Blu-tiga), tiuj de Tokaj pro *Aszu*, Villány pro *Kékoportó* kaj Eger pro *Leányka* (Fraŭlineto).

Ĝis antaŭ du jarcentoj ankaŭ en la regiono de Buda estis kultivataj vinberoj: epidemio, la radik-malsano filoksero, ilin detruis. Sed ankoraŭ troviĝas resovaĝiĝintaj vitoj sur la sunaj deklivoj de la ĉirkaŭaj montetoj kaj ankaŭ enĝardene zorgeme rastritaj, alligitaj vito-linioj.

Apenaŭ eblas imagi ĝardenon sen vinber-laŭbo: agrablas la vito grimpana sur la tegmenton, donanta delikatan ombron en la verando, ankaŭ rubenkoraj, acidetaj beroj, kiujn oni manĝas konkurante kun la merloj.

Judit FELSZEGRY

Batila batalo

Antaŭ kelkaj semajnoj, mia edzino volis aĉeti varman ĉapon, taŭgan por malvarma lando, kien ŝi intencis ekskursi. Ni eniris malgrandan magazinon, kie oni vendas sportvarojn kaj vestaĵojn por subĉiela aktiveco. Dum ŝi trarigardis la stokon, kaptis mian atenton basbalaj batiloj supozeble importitaj el Usono.

Mi demandis, kiu en Irlando ludas basbalon. La vendisto respondis, ke per la batiloj oni ne ludas sed sin defendas. Mi jam sciis, ke basbal-batiloj popularas inter krimuloj, sed la vendisto asertis, ke tiuj, kiuj aĉetas ilin, estas precipe taksiistoj kaj butikistoj.

Mia edzino miris pri tiu aserto, ĉar – kiel ŝi poste diris al mi – basbal-batilo, sufiĉe longa, ne facile uzeblas en la limigita spaco de takcio. Plie, proprietulo de etbutiko (ekzemple juvelisto, horloĝisto aŭ vendisto de porcelanaĵoj) riskus frakasi siajn varojn.

Krimulo fariĝas viktimo

Mi respondis, ke tiu riskus frakasi ne nur sian stokon sed ankaŭ la kapon de ŝtelisto. En tiu okazo, ne la krimulo sed la butikisto estus arestita, eble enkarcerigita, kaj verŝajne devus kompensi la homon, kiu provis priŝteli la vendejon. Tiaj okazoj oftas: krimulo fariĝas viktimo. Ŝajne, laŭ la irlandaj leĝoj, oni ne rajtas ataki atakantojn: permesate estas nur forkuri aŭ voki policiston (kiu tro malfrue aperos). Mi simpatias kun la veraj viktimoj de krimoj tiaj, sed mi dubas, ĉu posedi basbal-batilon praktike defendas aŭ solvas krimproblemojn en la nuna socio.

La proprietulo de la sportvendejo, kie mi vidis la batilojn, diris, ke klientoj aĉetas ilin, ĉar ne ekzistas alia rimedo. En Irlando, civiluloj ne rajtas posedi aŭ porti armilojn, krom en tre limigitaj cirkonstancoj. Malfacilas akiri polican permesilon por havi pafilon. Eĉ posedi mallongan bastonon, kian portas policano, malpermesatas al ordinaraĵo civitanoj.

Murdoj kaj atakoj

Tial honestaj civiluloj elektas aĉeti basbal-batilojn, kiujn oni rigardas kiel sportartiklojn, ne armilojn. Sed ĉu fakte ili estas la honestaj? Mi ne demandis al la butikisto (ĉiaokaze, kiel li sciis?), sed mi dubas pri la honesteco de la aĉetintoj. La amaskomunikiloj konstante raportas pri murdoj kaj atakoj kontraŭ senkulpaj homoj – krimoj faritaj ofte de junuloj sub la influo de alkoholo kaj/aŭ narkotaĵoj. Pli lertaj kaj maturaj krimuloj preferas, kaj povas facile akiri, pafilojn. Junaj deliktuloj plej ofte uzas batilojn, ferstangojn aŭ tranĉilojn. Ili malofte estas kaptitaj kaj punitaj.

Mi demandas min, kiuj estas la komercistoj, kiuj importas basbal-batilojn. Ili certe scias, ke irlandanoj ne ludas basbalon. Oni konscie komercas per varoj, kiuj ŝajne estas sportartikloj, sed fakte armiloj.

Sukero, salo kaj kemiaĵoj

Por mi estas mistero, kial Usono – grandanima kaj malavara lando – eksportas ne siajn plej bonajn, belajn kaj noblajn varojn, kiuj estas multaj kaj dezirindaj, sed siajn malpli dezirindajn,

malpli belajn kaj malpli utilajn. Inter tiuj troveblas militaj armiloj, kiuj disvastigas malpacon; t.n. „rapidvoraĵoj” enhavantaj tro da sukero, salo kaj kemiaĵoj, kaj kiuj kondukas al dikiĝo, eventuale al diabeto, blindeco kaj malpli longa vivo; genetike modifitaj grenoj, kies efikoj estas nekona-taj; maĉgumo, kiu ĉie makulas trotuarojn; malelegantaj vestaĵoj, ĉapoj kaj ŝuoj (dum enlande en Usono oni povas aĉeti belegajn modaĵojn kaj ŝuojn); kaj usonangla ĵargono, kiu iom post iom uzurpas la lingvaĵon de Ŝekspiro (kvankam kelkaj elstaraj anglalingvaj verkistoj kaj poetoj estas nord-amerikaj).

Mi trovas ĉi tiun fenomenon eĉ pli nekomprenebla, ĉar la usonanoj, kiuj loĝas en Irlando aŭ vizitas ĝin kiel turistoj, kutime estas ĉarmegaj. Ofte, sur la stratoj de nia ĉefurbo, oni renkontas usonanojn kaj konstatas, kiom simpatiaj ili estas. Ili alparolas nin per ĝentila, ĉarme malnovmoda lingvaĵo, kiu hodiaŭ apenaŭ aŭdiĝas inter ni.

Siro kaj damo

Ili respektoplene salutas kaj dankas, uzante la titolojn *Sir* kaj *Mam* (siro kaj damo), kiuj en Britio uzatas, kiam oni alparolas gereĝojn aŭ nobelojn. Usonanoj estas pli ĝentilaj ol ni, kiuj ne plu uzas titolojn (krom, eble, „doktoro” aŭ „pastro”) kaj, malkiel ili, ofte forgesas simpatiajn frazetojn „Permesu” kaj „Dankon”.

Sed, revenante al basbal-batiloj, mi ne kredas, ke usonaj komercistoj eksportas siajn varojn pro malico. Verŝajne ili naive supozas, ke la tuta mondo amas kaj volas praktiki ilian plej ŝatatan sporton. Sed la reguloj de basbalo kaj de usona futbalo tiom bizaras, ke mi esperas, ke irlandanoj neniam forlasos siajn tradiciajn gaelajn ludojn.

Bedaŭrinde, la irlandanoj lastatempe ekinteresiĝas pri angla kriketo, kiu, laŭ mi, estas la plej longa kaj teda sporto en la mondo (kvankam mi agnoskas, ke, por turistoj, ĝi estas pitoreska elemento de la vivo en Anglio). Parenteze, la peza kriket-batilo povus esti eĉ pli efika armilo ol la basbala – sed tion prefere ne malkaŝu al krimuloj.

Garvan MAKAJ
Irlando

Ĉu biokarburajoj helpas aŭ malhelpas?

Nuntempe oni ĝenerale akceptas, ke la energikonsumo endanĝerigas nian socion. Unuflanke la kutimaj, facile troveblaj kaj uzeblaj energifontoj iom post iom elĉerpiĝas. Aliflanke la daŭra grandskala uzo de energio influos (kaj eble jam influas) la klimaton. Bonaj solvoj maloftas.

Projektoj abundas, sed neniu donas tujan helpon. Nuklea fuzio daŭre restas en eksperimenta fazo kaj bezonos jardekojn por kontribui al la energiproduktado. Hidrogeno ŝajnas ideala, sed ĝia uzo estas komplika. Grandaj akvobaraĵoj por funkciigi hidroelektrajn centralojn estas malŝatataj de mediprotektantoj pro siaj kromefikoj. Inter la kelkaj metodoj kiuj nun reale, kvankam modeste kontribuas al la energiproduktado elstaras la elektroproduktado per ventoturbinoj kaj la biokarburajoj (produktitaj surbaze de plantoj, anstataŭ mineralaj karburajoj, kiuj devenas de ekzemple nafto), sed ankaŭ pri ilia reala utilo estas duboj. Tamen, ĝis nun la kelkaj negativaj informoj dronis en la grandskalaj reklamkampanjoj de registaro kaj industrio.

OEKE starigas demandojn

Meze de 2007 unuafoje grava instanco aliĝis al la flanko de dubantoj. OEKE (Organizaĵo por Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo, angle *OECD*) aperigis kelkajn studojn, kiuj sufiĉe malfavore prijuĝas la produktadon kaj uzon de biokarburajoj. Unu studo nomiĝas *Biokarburajoj: ĉu la rimedo estas pli malbona ol la malsano?* (angle: „*Biofuels: is the cure worse than the disease?*”). La alia studo havas neŭtralan titolon *Agrikultura prognozo 2007-2016* (angle: „*Agricultural Outlook 2007-2016*”) kaj estis verkita kunlaboro kun la Nutraĵa kaj Agrokultura Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj.

Biokarburajoj kiel biodizelpetrolo kaj bioetanolo kontribuas ĝis nun nur kelkajn procentojn al la energiproviza-

do. Novtipaj teknologioj kaj pli granda agrikultura areo povus kreskigi la produktadon ĝis kelkdek procentoj de la entute bezonata kvanto. Tiuj novaj teknologioj bedaŭrinde ankoraŭ ne reale ekzistas, kaj konsiderinde pli grandigi la areon apenaŭ eblas. Nur Brazilo grandkvante kaj modere produktas. Tio ankaŭ eblus en landoj de Sud-Ameriko kaj Afriko kun simila klimato, sed por tion fari necesus uzi la areon de tropikaj arbaroj, tute neakceptebla ago. Malgrandskale ankaŭ eblas racia produktado en skandinaviaj landoj, surbaze de la restaĵoj de la ligno-industrio. Kvankam iuj favoras stimuli la internacian komercon de biokarburajoj, ŝajnas plej logike uzi ilin en la regionoj, kie okazas la produktado.

En la cetero de la mondo la produktado de biokarburajoj fakte ne havas sencon. Tie tiuj karburajoj havas uzantojn nur ĉar rektaj kaj malrektaj ŝtataj subvencioj kaj regulado favoras ilin. Ekzemplo de tio estas la deviga aldonado de kelkaj procentoj da biodizela petrolo al la normala petrolo. Krom la troaj kostoj, ankaŭ estas la nefavora energi-bilancio de ilia produktado en

regionoj, kie la klimato ne estas ideala: la kultivado de la plantoj, ilia transporto kaj prilaboro ankaŭ postulas energion, kaj oni devas demandi sin ĉu la finfine produktita kvanto de karburajoj sufiĉe superas la kvanton de energio foruzata dum la produktado. Estas demando kiun multaj ne emas respondi ...

Alia misefiko estas la kresko de nutraĵ-prezoj. La areo uzata por produkti biokarburajojn ne plu estas disponebla por produkti manĝaĵojn. Se nutrogrenoj estas uzataj por produkti biokarburajojn, ekmankas manĝaĵoj kaj kreskas la prezoj. Komence de 2007 okazis ribelado en Meksiko pro prezaltiĝo de maizo. Dum la somero ankaŭ en Eŭropo oni anoncis plurloke grandajn prezaltiĝojn de manĝaĵoj. Pri tio kulpas ne nur la biokarburajoj, sed pluraj kaj tutmondaj kialoj: kelkloke la rikoltoj estis malprosperaj, la jardekojn daŭranta troproduktado finfine estas bridita, kaj ekonomie bonfartaj landoj kiel Ĉinio postulas pli kaj pli kvalitajn manĝaĵojn. Entute tio montras, ke la ekvilibro en la merkato de manĝaĵoj estas facile perturbebla.


Ventoturbinoj kaj fotovoltataj ĉeloj

En okcidenta Eŭropo oni nuntempe planas kaj konstruas pli kaj pli grandajn ventoturbinojn por produkti elektron. Unuavide, tio estas salutinda evoluo, ĉar tiu produktadmetodo ne poluas. Bedaŭrinde estas ankaŭ multaj malavantaĝoj. La vento estas kaprica kaj dum periodoj sen vento aŭ kun tro forta vento necesas uzi rezervan kapaciton, en aliaj periodoj senutilan. Elektro apenaŭ estas grandkvante stokebla (krom per komplikaj metodoj, ekzemple uzante troan elektron por pumpi akvon supren en akvobaraĵojn). Necesas tute redesejni la altatensian distribu-reton, ĉar la trafiko ne plu iras en unu direkto (de grandaj centraloj al konsumantoj), sed en ĉiuj direktoj, kaj plifortigi la transŝtatajn retojn. Fine, la produktantoj de ventoturbinoj dum la pasintaj jaroj, pro la alta postulado, investis precipe en kapacito kaj ne en kvalito. Pro tio tro da turbinoj pro teknikaj problemoj dum longa periodo ne funkcias.



www.oecd.org/dataoecd/33/41/39276978.pdf (Biofuels: is the cure worse than the disease?)

www.oecd.org/dataoecd/6/10/38893266.pdf (OECD-FAO Agricultural Outlook 2007-2016; resumo en pluraj lingvoj)



Ankaŭ la produktado de elektro per fotovoltataj ĉeloj provokas kritikojn. Pro la alta kostoprezo kaj la malgranda rendimento, ĝi estas efika nur en idealaj cirkonstancoj, kie abundas suno. Por iuj aplikoj ĝi ankaŭ aliloke havas sencon, sed en mezvarmaj klimataj zonoj ĝi kutime pluvivas nur pro alta subvenciado (ankaŭ nerekte, ĉar elektrodistribuantoj estas devigataj aĉeti tiel produktitan elektron je ege altaj prezoj). Rekta transformado de suna varmo en ekzemple varman akvon por hejtado estas malpli komplika kaj pli racia.

Inteligenta produktado

La karburajoj produktitaj surbaze de nafto estas kvazaŭ idealaj: facile transporteblaj kaj stokeblaj, malmultekostaj, normigita kvalito, sen risko de putriĝo, multflanke uzeblaj ... Fakte estas skandalo ke tiel altkvalitaj varoj ankoraŭ ĉie estas uzataj por simplaj aferoj kiel hejtado, por kiuj oni povus facile uzi malpli kvalitajn energifontojn. Anstataŭe, oni klopodas konvinki nin, ke havas sencon kun multe da peno, mono kaj energio transformi tiajn sim-

plajn karburajojn (plantojn, rubaĵojn) en altkvalitan dizelpetrolon aŭ gason, kiuj ĉiuokaze neniel povas sufiĉi por kontentigi la kreskantajn bezonojn.

Tuja solvo: ŝparemo

Atendante iun idealan solvon, kiu eble neniam venos, restas nur unu saĝa vojo: esti laŭeble ŝparema konsumante energion. Ĉar plejparto de la homoj ĝis nun nur malvolonte tiel kondutas, iom da helpo de supre estus bonvena. Simpla regulo kun tuja efiko: limigi la maksimuman rapidecon de aŭtoj kaj imposti ilin laŭ la uzo (pagigante ne ĉe la aĉeto de aŭtomobilo, sed laŭ la energikonsumo) povus ŝpari kvanton da karburajoj pli grandan ol la kvanto de produktitaj biokarburajoj.

Roland ROTSART



STATISTIKO

Averaĝa litovo



GYTIS CIBULSKIS

Laŭ statistiko mezuma litovo disponas nur pri preskaŭ 198 eŭroj monate. Resume, se ĉiuj litovoj estus „statistikaj litovoj”, ili apenaŭ povus vivteni sin. Unu persono por nutraĵo, vestoj ktp. monate elspezas 189 eŭrojn kaj finfine liberaj restas nur apenaŭ 9 eŭroj. Tiu sumo sufiĉas nur por unu dupersona vizito al kinejo, teatro aŭ nemultekosta restoracio.

La plej granda kvanto – ĉirkaŭ 64 eŭroj monate aŭ 2 eŭroj tage – elspeziĝas por akiro de manĝproduktoj. Tiu sumo sufiĉas por ĉiutage aĉeti almenaŭ unu panon, unu litron da lakto kaj iom da malmultekostaj viandaĵoj.

Dua granda elspezoparto konsistas el pagoj por la loĝejo. Elektro, akvo kaj gaso statistike kostas preskaŭ 23 eŭrojn monate aŭ 0,75 eŭrojn tage. Alivorte, averaĝa litovo ĉiutage povas permesi por si iom trinki, iomete hejti sian loĝejon kaj ion kuiri aŭ eĉ lavi sin.

Por vestaĵoj kaj ŝuoj litovo monate elspezas preskaŭ 16,5 eŭrojn. En ordinara vendejo tiu sumo sufiĉas por aĉeti unu ĉemizon, unu paron da ŝtrumpoj kaj kelkajn malmultekostajn subvestaĵojn, aŭ nur duonon de normalkvalita pantalone aŭ unu ŝuon.

Por statistika litovo transporto monate kostas 19,50 eŭrojn. Rezulte averaĝa litovo, se li posedas aŭtomobilon, povas en ĝian ujon enverŝi ĉirkaŭ 20 litrojn da benzino. Per tiu kvanto li povas veturi ĉirkaŭ 200 kilometrojn. Se statistika litovo ne posedas aŭton, li, depende de sia loĝloko, povas aĉeti 50

ĝis 100 biletojn por loka publika trafiko aŭ dufoje veturi kaj reveni, ekzemple, inter Vilnius kaj Kaunas, kiuj distancas je ĉirkaŭ 100 km.

Por alkoholaĵoj kaj tabako monate restas respektive 5 kaj 2,30 eŭroj. Tio sufiĉas por trinki unu botelon de mezkvalita brando aŭ 6 ĝis 8 botelojn da biero kaj fumi eĉ du paketojn de la plej popularaj cigaredoj – averaĝe po unu kaj duono tage. Post aliaj diversaj elspezoj, ekzemple por sano kaj instruado, finfine restas 9 eŭroj.

Se oni aĉetas vestaĵojn kaj ŝuojn ne ĉiumonate, sed, ekzemple, unu fojon dum duonjaro, oni disponas konsiderindan sumon, per kiu eblas aĉeti unu pantalonon, paron da ŝuoj, iom da ŝtrumpoj kaj, se oni bonŝansas, du ĉemizojn. Se oni aĉetas en vendoplaco aŭ en vendejo de uzitaj vestaĵoj, eblas eĉ pli bone provizi sin. Kaj aldonante tiujn liberajn 9 eŭrojn butikumado povus esti sufiĉe sukcesa.

Jen tiel vivas statistika litovo. Feliĉe nur, ke statistiko ne ĉiam spegulas la realon.

LAST

Registaro asertas, ke manĝaĵoj estas sekuraj

Lastatempe en la eŭropa kaj usona gazetaroj aperis artikoloj pri ĉinaj produktoj, kiuj povas endanĝerigi la sanon. Precipe temis pri ludiloj, kies farbo povas noci infanon, kiu metas la ludilon en la buŝon, sed estis plendoj ankaŭ pri manĝaĵoj.

Meze de aŭgusto de 2007 la novaĵa oficejo de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio publikigis „blankan libron”, kun titolo *La kvalito kaj sekureco de ĉinaj manĝaĵoj*. Per tia libro la registaro unuafoje provis senpartie konigi al la monda publiko la sekuran staton de ĉinaj manĝaĵoj.

La libro montras, ke ĝenerale la manĝaĵa kvalito stabilas je alta nivelo. Dum la pasintaj jaroj ĉiam pli ol 99 % de la eksportitaj manĝaĵoj respektis la kvalitnormojn. Por eksportoj al Eŭropo tiu kvoto atingis eĉ 99,8 %. Okaze de enlandaj kontroloj la kvalito pliboniĝas. Specimenaj kontroloj en la tuta lando dum 2006 montris, ke 77,9 % de la

manĝaĵoj estis bonkvalitaj; en la unua parto de 2007 la proporcio kreskis ĝis 85,1 %. De la totala eksportita agrikultura produktaĵo, 90 % estas produktoj „verdaj” (produktitaj kun respekto por la natura medio).

Kvankam rilate al la kvalito de ĉinaj manĝaĵoj ja ankoraŭ ekzistas kelkaj problemoj, la registaro streĉas la pensojn kaj agojn, por ke tiuj problemoj iom post iom estu solvataj. Ekzemple, ĝi jam faris la unuajn paŝojn por enkonduki arkivsystemon ĉe manĝaĵaj entreprenoj por plifaciligi kaj pliefikigi la kontroladon. Ĝi ankaŭ komencis aperigi nomlistojn ruĝan (por bone




konduktantaj eksportantaj entreprenoj) kaj nigran (por kritikendaj entreprenoj). Precipe la etaj manĝaĵfarejoj (kun malpli ol dek laboristoj) estu severe kaj ofte kontrolataj, ĉar nur 70 % de tiuj funkcias laŭnorme.

Porka malsano altigas la prezojn

Pro terura infekta malsano kiu trafis kelkajn regionojn, multaj porkoj en ĉinaj bredejoj mortis. Tio ne influas la kvaliton de la vendata viando, sed pro la malpli granda oferto la prezoj de porkoviando leviĝis. En julio tiu viando vendiĝis kontraŭ 26 juanoj por unu kilogramo. En aŭgusto la prezo estis 30 ĝis 32 juanoj. Ankaŭ aliaj varprezoj draste supreniras.

Mu Binghua

Ĉefaj landoj al kiuj Ĉinio eksportas manĝaĵojn



La teksto de la blanka libro (en angla lingvo) legeblas je www.chinadaily.com.cn/bizchina/2007-08/18/content_6032837.htm

Nanoq – la unua arkta muzeo

Dum siaj longaj vojaĝoj, ekspedicioj kaj restadoj en borealaj regionoj, kiuj daŭris 25-30 jarojn, finno Pentti Kronqvist lernis profunde respekti kaj admiri loĝantojn en Kanado kaj Gronlando, kiuj vivas en naturkondiĉoj ne elteneblaj por homoj el la sudaj mondpartoj. Ni ofte nomas ilin eskimoj, tamen ne ĉiuj el ili ŝatas tiun nomon. Ĝi devenas de indianaj lingvoj kaj signifas „manĝantoj de kruda viando”. Tial prefere ni nomu ilin inuitoj (la solaj homoj). Antaŭe en ties regionoj ili ja ne renkontis aliajn homojn, kiam la „blankuloj” ĉiam ankoraŭ ne interesiĝis pri ili.

Kronqvist ekdeziris fondi muzeon kaj studcentron pri la arkta regiono kaj ties loĝantoj. Li entuziasmigis siajn geamikojn kaj kune ili kreis la muze-



EDWARD SANDERSON

on Nanoq (blanka urso), inaŭgurita en 1991 apud la okcidentfinna, parte svedlingva urbo Pietarsaari/Jakobstad. La muzeon oni konstruis ĉefe el torfo laŭ la ekologiaj tekniko kaj modeloj, uzataj de inuitoj mem. Ĝi bone kaŝiĝas en sia arbara kaj roka ĉirkaŭaĵo.

La muzeo nuntempe posedas pli ol mil librojn pri Arkto, filmojn kaj fotojn pri inuitoj, faritajn de Kronqvist mem, aŭtentajn manlaboraĵojn, vestaĵojn, fiŝkaptilojn kaj aliajn ĉasilojn, objektojn de la ĉiutaga vivo kaj memoraĵojn de famaj ekspedicioj malsukcesaj aŭ bonŝancaj ekde la 18a jarcento. Ĝi estiĝis grava studcentro por en- kaj eksterlandaj esploristoj. Kortuŝa kaj admirinda estas la kolekto de multformaj skulptaĵetoj el steatito. Oni povas

konatiĝi ankaŭ kun inuitaj ritoj, tomboj, kaptado de fokoj, kaptado de balenoj en la 16a kaj 17a jarcentoj, kiu ne endanĝerigis la specion.

Apud la enirejo de muzeo staras figuro de impona blanka urso. Ĉirkaŭ ĝi viziteblas diversaj dometoj el torfo. Oni povas ankaŭ refreŝigi sin en la kafejo. Sian aŭton oni tamen lasu en parkejo, kiu situas iom pli fore. Al la muzeo oni venas piede laŭ pado inter rokoj kaj pinoj de la Botnia Golfo.

Saliko



Nekonata genio

Anglalingvaj irlandaj verkistoj kaj poetoj estas tutmonde konataj kaj admirataj. En tiu rilato sufiĉas menci nomojn kiel James Joyce [ĝejmz ĝojs], Oscar Wilde [oskar ŭajld], William Butler Yeats [ŭiljm botlr jejts] kaj George Bernard Shaw [ĝorĝ bernrd ŝo], sed oni povus listigi multe da aliaj verkistoj. Unika inter ili estis Samuel Beckett [beket], kiu verkis kaj en la angla, kaj en la franca. Ĝis nun la Nobel-premio pri literaturo estis aljuĝita al ne malpli ol kvar irlandaj verkistoj.

Tamen, preskaŭ nekonata – eĉ inter multaj el siaj samlandanoj – estas unu el la plej elstaraj verkistoj, nome Máirtín Ó Cadhain (1906-1970), kies verkaro en la irlanda (gaela) lingvo estas rigardata tiom altvalora kiom la plej bona irlanda literaturo en la angla. Ĉar la gaela, malkiel la angla, ne estas vaste disvastiĝinta lingvo, Ó Cadhain apenaŭ estas fama ekster la eta mondo de gaelparolantoj. Plie, li ofte uzis dialektajn vortojn kaj tropojn, kiuj ne estis kutimaj krom en malgranda regiono en okcidenta Irlando. La kontributo de la artikolo en la *Enciklopedio de Irlando* pri ĉi tiu verkisto asertas: „Ó Cadhain scipovis plenumi per majstreca kaj kelkfoje inkandeska prozo delikatajn studaĵojn pri konscienco kaj karaktero.”

Máirtín Ó Cadhain, aŭtoro, akademiano kaj lingva aktivisto, naskiĝis en la graflando Galway [golŭej] (gale: Gaillimh [galjiv]). Kiel inteligenta studento, li gajnis stipendion, kiu ebligis al li daŭrigi sian studadon en altlernejo en Dublino. Post tiu periodo (1924-1926) li estis dungita kiel lerneja instruisto sur eta insulo. Li translokiĝis al alia loko (Camus [kamas]) en la graflando Galway, kie li ricevis postenon de lernejestro. Dum sia restado en Camus li komencis sian tutvivan kolektadon de folkloraj kaj materialoj rilataj al la

diversaj gaelaj dialektoj de tiu regiono. Kiam li forlasis Camus en 1932, li akceptis alian lernejestran postenon en Carnmore, Galway, sed en la jaro 1936 li estis maldungita pro gvidado de grupo kiu partoprenis en politika aranĝo ne aprobita de la klerigaj aŭtoritatoj. Li fondis la organizaĵon *Muinntir na Gaedhealtachta* [mujntjir na gejltahta] (Popolo de la gaela regiono) kaj estis unu el la ĉefaj instigantoj de kampanjo por transloĝigi gaelparolantojn de la malfekunda teritorio de Conamara [konamara] en okcidenta Galway, al agrikultura regiono en la graflando Meath [mit] (gale: Mi'), je kelkaj kilometroj norde de Dublino. Tiel, en 1930 estis kreita la unua gaela distrikto en orienta Irlando depost la granda malsato en la 19a jarcento. Tiu gaelparolanta distrikto ankoraŭ ekzistas.

Dumtempe Ó Cadhain estis oficiro en la Irlanda Respublikisma Armeo (IRA) kaj dufoje estis internigita (1939 kaj 1940-1944). Post sia liberigo li hejmiĝis konstante en Dublino, kie li daŭrigis sian verkadon, kiu publikige komenciĝis per la eldono de novelaro sub la titolo *Idir Shúgradh agus Dáiríre* [idir hugra agas dorire] (Inter ŝerco kaj seriozeco). Sekvis multaj gravaj verkoj en la gaela kaj kelkaj skribaĵoj en la angla. En Dublino li laboris kiel tradukisto ĉe registara instanco, sed en 1956 li iĝis lektoro en la prestiĝa universitato *Trinity College*. En 1969 tiu altlernejo nomumis lin katedra profesoro de la lingvoj gaela kaj keltaj. Dum sia tuta vivo li abunde verkis kaj laboris por la lingvo kaj por sia gaela popolo. Lia lasta eldonita verko estis *An tSraith Tógtha* (La leviĝinta falĉaĵo).

Al ĉi tiu mallonga biografio mi povas aldoni personan postskribon. En iu somero antaŭ kelkaj jardekoj, kiam mi feris en la Foraj Hebridoj en okcidenta Skotlando, mi renkontis Máirtín Ó Cadhain. Li estis vizitanta la skotga-



Portreto de Máirtín Ó Cadhain.

elajn insulojn por konatiĝi kun la tiea popolo kaj iliaj dialektoj. Dum kuna promenado li diris al mi, ke (kvankam li estas katoliko) li ŝatas ĉeesti la dimanĉajn skotgaelajn diservojn en la lokaj presbiterianaj preĝejoj, ĉar li admiras kaj ĝuas la belan lingvaĵon kaj la elokventon de la predikantoj kaj la konversaciojn pri komplikaj teologiaj temoj de la adorantoj, kiam ili hejmen piediras post la diservo. Ĉefe plaĉis al li aŭskulti la riĉan gaelan vortprovizon kaj ĝui la inteligenton de la insulanoj. Antaŭe li menciis, ke li iam estis membro de IRA, kaj, ĉar mi estis juna kaj ne havis grandan sperton pri la komplekseco de la homa spirito, mi iom miris, ke tiu milda kaj ĝentila persono estis eksbatalanto en armita organizaĵo. Samtempe, por mi estis grandega privilegio koni tiom gravan verkiston kaj simpatian homon.

Garbhan MacAoidh

La movada koro sur viddisko



Se vi ne jam vizitis la Centran Oficejon (CO) de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kaptu nun la okazon: vi ne devos rezervi flug- aŭ trajn-bileton. Sufiĉas ŝalti vian DVD-legilon. Nu, jes, neniuj vidvizitoj anstataŭas fizikan viziton, sed per ĉi tiu disko vi almenaŭ antaŭgustumos la plezuron konatiĝi kun la „domo de esperantistoj”. Malantaŭ la kameraoj gvidas onin tra la koridoroj, ĉambroj kaj ŝtuparoj de la kvaretaĝa domo Francisco Veuthey, mem eksa CO-oficisto, kaj Peter Baláž, slovaka Esperanto-eldonisto. Antaŭlude, oni ĵetas rapidan rigardon al la situo kaj historio de Roterdamo por poste sekvi la paŝojn de litova belulino (Indrė Pileckytė), kiu, de roterdama trajnstacio, kondukas la spektanton al la plej fama esperantista adreso, kun jarlibro enmane.

Oni trafas la „nervocentron” de UEA en speciala okazo, kiu jam fariĝis konstitucia



por pluraj: la Malferma Tago. Duoble speciala okazo, ĉar en tiu novembro 2005 oni festis ankaŭ la 50-jariĝon de la CO en Roterdamo. Do, krom la konataj vizaĝoj, oni renkontas tie kaj tie vizitantojn kaj eks-oficistojn, jen ĉe kafotablo, jen ĉe interesa parolado aŭ tutsimple en vigla koridora babilado.

Post kelkaj vortoj de Osmo Buller, interalie pri la celoj de UEA kaj de la CO, Clay Magalhães, posteulo de Nikola Rašić en organizado de UK-oj, kartografias la domon, ĉiĉeronante ĉambron post ĉambro. Bedaŭrinde, la sonkvalito ne tre bonas kaj la voĉoj de la parolistoj ne ĉiam rivalas sufiĉe laŭte kun la fona muziko. Sed kontraŭ tio sufiĉas streĉi la orelojn.

Tri aldonaĵoj riĉigas la ĉefan filmon: *Bild-historio de CO*, *Fotogalerio* kaj la ero *Malantaŭ la kurteno*, kiu prezentas sur fotoj la kulisojn de la produktado de la DVD.

Reinaldo Marcelo FERREIRA

Peter Baláž (reĝisoro): *Vizito al la Centra Oficejo*. Eld. Espero kaj UEA, Roterdamo, 2006. 24 minutoj, formato 4:3.

Prezo ĉe FEL: 15 eŭroj + afranko.



Sukcesoplena, ŝercoplena kaj tre malkutima

Unuavide onin trafas la rimarko, ke tute mankas tabelo de enhavo, aŭ iu alia indekso, por ĉi tiu libro. Kombininte tiun rimarkon kun medito pri la tre strangasona titolo „Nemave edifi”, oni konkludas, ke atendas legon tre nekutima libro. Kaj oni plene pravas.

Krome tiu libro ne nur siamaniere ja edifas, kaj tute vere „nemave” (= ne malbone), la enhavo tiom ridigas la leganton, ke oni facile forgesas, ke temas pri instrulibro.


Temas, plejparte, pri la spertoj de spiono 005, kies sekreta tasko estas protekti Esperanton kontraŭ atakemaj malamikoj kaj insidaj reformistoj. Sed kiaj malamikoj? Nu, ĉefe la loĝantoj de Volapukastano. Kaj kiaj reformistoj? Nu, oniaj antaŭsupozoj eraras, kaj mi lasos al vi legi pri ili en la libro.

Forme, la plejparto de la libro konsistas el sinsekvo de satiraj kaj parodiaj dramtekstoj, en kiuj spiono 005 ĉefe aŭ parte rolas; ĉiun sekvas granda serio de enigmaj demandaroj, ekzercoj kaj taskoj, kies plenumo postulas detalan kaj tre kribran trastudadon de la koncerna dramo. Enestas ankaŭ poemo, prikomputila farso (titolita „La Diservanto kaj la tomato”), scienc-fikcia dramo, celanta kompari la nombron de esperantistoj sur la tero kaj sur Venuso, kaj kiom pli! Ĉiu kun propraj ekzercoj.

Per la parodioj kaj spektaklaj satiroj vi multegon lernos per ĉi tiu libro. Ĉu vi volas scii, kial la Universala Kongreso en Adelajdo daŭris multajn monatojn (ĉar iu forŝtelis la oficialan martelon, per kiu oni fermas universalajn kongresojn)? Kiom da vortoj kapablas paroli kamelo? Kiel sonas la Fonetika Esperanto, laŭ kiu oni prononcas ankaŭ ĉiujn interpunkciajn signojn?

(Se mi ĝuste memoras, la muzik-komediisto Victor Borge distradis siajn aŭskultantojn per simila sistemo, rilate la anglan lingvon, antaŭ multaj jaroj.) Kiel produkti konstantajn furzojn? Kiel kalkuli la suman nombron de esperantistoj? Kial fiaskis la Esperanto-movado sur Venuso? Kiu torturo estas la plej maltolerebla el ĉiuj torturoj? Veran enciklopedieton da absurdaj, komikaj pseŭdofaktoj prezentas al ni Stefan MacGill. Kaj, kiel oni scias, ĉe la bazo de ĉiu ŝerco, kutime kaŝite, ekzistas tre reala vero, kiun oni preferas ignori aŭ nur prieŭfemismi.

Ĉu via klubo aŭ kursanaro deziras enscenigi rolludojn bazitajn, pli-malpli, sur la dramoj en la libro? Detalojn pri la materialoj, metodoj kaj temoj donas la antaŭlasta parto de la libro.



Da preseraroj, lingvaj eraroj kaj aliaj ĝenaĵoj mi rimarkis neniom.

Pli profundan rekomendon de libro mi ne kapablas fari.

Donald BROADRIBB

Stefan MacGill: *Nemave edifi*. Eld. FEL, Antverpeno, 2007. 263 paĝoj kudritaj. ISBN 90-77066-25-X.

Prezo ĉe FEL: 19,99 eŭroj + aŭfranko.



Pri edukado de geniuloj



La tri fratinaj-ŝakistoj Polgár estas famegaj ne nur en Esperantujo. Jen nur kelkaj el iliaj multegaj atingoj: Zsuzsa (naskiĝis en 1969) estis en 1991 inter la unuaj virinoj, kiuj ricevis la titolon „grandmajstro” laŭ la kriterioj aplikataj al viroj. Zsófia (naskiĝis

en 1974) en Romo en 1989 venkis en turniro, en kiu partoprenis pluraj fortaj grandmajstroj, tiel kreante novan Guinness-mondrekordon. Kaj Judit (naskiĝis en 1976) rompis en 1991 la rekordon por plej juna grandmajstro kaj estas kun granda margino la plej forta virina ŝakisto en la historio.

En ĉi tiu libro ilia patro-instruinto-trejnisto László Polgár (naskiĝis en 1946) klarigas, kiel li edukis ilin kaj ankaŭ kial. Jen liaj propraj vortoj: „Mi donas ne recepton, nur vidmanieron kaj volas persvadi neniun al edukado de geniuloj. Mi volas nur montri, ke eblas eduki geniulojn. Mi alvokas neniun, instigas neniun, ĉiu devas mem decidi, kion li volas fari. Mi nur transdonas mian pedagogian sistemon kaj kondukas ĉiun sur la vojo, kiun ankaŭ mi trairis, kun la certeco, ke eblas eduki geniulon kaj ankaŭ indas, ĉar el geniulo fariĝas feliĉa homo” (p. 119).

Alivorte, la aŭtoro pretendas havi pedagogian sistemon, per kiu li povus el ĉiu sana infano eduki geniulon pri iu ajn fako, kaj la edukadon de siaj infanoj li nomas pedagogia eksperimento, per kiu li pruvis la efikecon de sia sistemo.

Tamen, evidente, en ĉi tiu 144-paĝa libro tiu pedagogia sistemo ne estas plene priskribita, kvankam ja enestas kelkaj interesaj detaloj pri la maniero, en kiu li unuafoje prezentis ŝakon al siaj junaj filinoj. Cetere, la koncepto „geniulo” neniam estis, almenaŭ por mi, adekvate difinita, kaj tro precizaj taksoj pri la nombroj de „supergeniuloj” kaj „genikandidatoj” en la mondo donas pseŭdosciencan aromon. Laŭ mi, la aŭtoro estas pli interesa, kiam li skribas pri emancipiĝo de virinoj (por liaj filinoj komence ne estis tute facile konkursi kiel ŝakistoj kaj ne nur kiel ŝakistinoj), pri la diskriminacio, kiun lia familio suferis fare de politikaj gvidantoj, kiel li evitis sendi siajn filinojn al lernejoj (ĉar lernejoj persekutas elstarulojn), kaj pri la mirinda kaj admirinda diligenteo de sia tuta familio.

La teksto estas en formo de intervjuo, kio iom ĝenis min, ĉar mi preferas tekston kun pli logika strukturo. Estas malfacile retrovi faktojn en la fluo de la interparolo. Kvankam la Esperanto-eldono aperis en 2004, ĝi, verŝajne, estas traduko de hungara originalo aperinta en 1989 (kiun mi ne vidis) kun nur la biografiaj informoj aktualigitaj. La kovrilo estas tre bela, kaj ankaŭ interne troviĝas 19 paĝoj da interesaj bildoj, sed la interna preskvalito iom malhelpas aprezi ilin.

Mi rekomendas la libron, ĉar ĝi levas kaj prilumas tre interesajn demandojn pri la rolo de edukado kaj denaska talento. Tamen, kompreneble, oni ne atendu trovi en la libro definitivan respondon al tiaj eternaj demandoj.

Edmund GRIMLEY EVANS

László Polgár: *Eduku geniulon!* Tradukis J. Horvath. Eld. Polgár Kft., Budapeŝto, 2004. 144 paĝoj broŝuritaj. ISBN 963-86531-0-8.

Prezo ĉe FEL: 15 eŭroj + afanko.

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tif. + 32 3 234 34 00;
tlk. + 32 3 233 54 33;
rete: retbutiko@retbutiko.net;
skajpe fel-monato

aŭ per www.retbutiko.net.



Mirakla preĝeja incendio

Dum riparlaboroj okaze de venonta 100-jariĝo incendio subite ekis en la preĝejo de la Sankta apostolo-evangeliisto Mateo en la eta litova urbeto Naujamiestis apud Panevežys. La okazintaĵo kaŭzis milion-kostan damaĝon. Plendante pri la malfeliĉo, la preĝeja pastro Algirdas Dauknys interalie menciis ankaŭ kvar miraklojn, kiuj esprimiĝis dum la incendio.

Laŭ la pastro, vere estas miraklo, ke ne forbrulis bildo de Maria, estis savita homo, ne rompiĝis la sonorilo, kaj ke la enflamiĝintaj turoj falis al ĝusta direkto. „Vere estas strange, ke la bildo de la mizerikorda (kompatema) Maria ne brulis, malgraŭ tio, ke la incendia fonto estis tute apude kaj la varmego neeltenebla”, diris la pastro. Ankaŭ mirakla estas tio, ke, male ol estis atendite, la sonorilo ne falis kaj ne enpikiĝis teren, ĝi eĉ ne trairis la duan etaĝon, ĝin haltigis arkaĵo.



Laŭ aserto de Dauknys, la tria miraklo estis savo de unu urbano. Du viroj sen informi aliajn interne de la preĝejo penis estingi la fajron, celante savi la orgenon. „La viroj opiniis, ke la incendio baldaŭ estos haltigita. Kiam komencis fali najloj kaj aliaj deŝiraĵoj, ili retiriĝis, tamen super iliaj kapoj enfalis la volbo”, rakontis la pastro. Tiam unu el la viroj kuris sur ŝtuparo kaj la alia perdiĝis en polvo kaj fulmo. Feliĉe, la viroj interkontaktiĝis, la unua surverŝis akvon sur la alian, prenis lian manon kaj ambaŭ forkuris.

La kvara miraklo estis tio, ke la brulantaj preĝejoj turoj falis al la ĝusta direkto, – ne al paroĥestrejo kaj aliaj najbaraj domoj, sed alidirekten.

LAST

Karulino – kanibalino



Karulino! Fidele vi telefonis al mi, kaj pacience dum longa, longa tempo vi malplenigis vian koron. Neniu alia montris al mi tian honoran konfidencon. Neniu alia kapablis pentri tian sencenzuran memportreton. Neniu alia emas paroladi ne atendente aliajn respondojn ol:

„Ĉu vere?”

„Ho ve!”

„Ho!”

Neniu estis tiel dankema kiel vi! Imagu, iam vi eĉ diris, ke ni estas kvazaŭ klonoj, ĉu ne?

Ĉu! Ĉu ni iom post iom jam kloniĝas? Ni ambaŭ estas malaltaj kaj diketaj. Plue ni ambaŭ havas mallonge tonditan buklon hararon, kaj ni portas okulvitrojn. Preskaŭ samaĝaj ni estas. Laŭ profesio ni ambaŭ estas instruistinoj. Kvankam eksedziĝintaj de longa tempo ni ambaŭ komferte loĝas solaj en komfortaj loĝejoj. Vi havas sendependan filon kaj mi havas egale sendependan filinon. Nek via filo nek mia filino faras skandalojn. Karulino nek vi, nek mi mem elektis la liberan vivon. Ne plaĉas al vi la soleco, nek al mi. Vi tamen hodiaŭ plendis, ke mankas al vi vera amikino; kiel kvazaŭa klono, ĉu mi estas ne vera amikino?

Hodiaŭ mi telefonis al vi.

„Kiel vi fartas?”

„Mezbone! Emocia afero estis la naskiĝtagdatreveno de Jozefo. Tridek geamikoj surprize gratulis lin matene. Kaj mia eksedzo estis tie! Kaj mi devis toleri lian ĉeeston. Kaj mi devis rideti, kiam li rakontis al ĉiuj la kutimajn malbonajn ŝercojn. Sed kompreneble mi oferis min por Jozefo. Cetere la eksedzo poste sekvis min, kaj li regalis min per biero en trinkejo. Imagu! Li babilis kvazaŭ ni ja estas ankoraŭ kunloĝantaj kiel geedzoj. Kia aroganteco! Feliĉe estas, ke li kun sia ĉiesulino baldaŭ translokiĝos eksterlanden. Vespere Jozefo kaj la koramikino invitis min manĝi en nova sufiĉe bona restoracio. Kia bela vespero, sed, ho ve, kia terura afero, ke mi devis hejmen reveni sola, kaj hejme estas neniu zorgema aŭskultanto, neniu! Neniu ajn! Vera amikino mankas al mi!”

Balancante la kapon mi diris al ŝi:

„Ĉu vere? Ho ve! Ho, fakte ankaŭ mi havis malagrablan sperton, kiu koncernis mian eksedzon ...”

Tamen ŝi daŭrigis: „Kial vi interrompis min? Kutime vi ...”

Mi parolis plu: „Jes, rilatas al mia eksedzo. La filino estas nuntempe en Londono, kaj antaŭ tri tagoj ŝi vespere telefonis al mi dirante, ke la patro dum tagoj ne prenas la telefonon, kiam ŝi vokas lin. Tia maljunulo eble

estas morte malsana. Ŝi memoris kaj mi memoris la onklon, mia frato, kiu mortis sola. Imagu, la kadavron trovis nur la prizorgistino, kiam ŝi vizitis lin. Bravulino ŝi estas, mia filino, sed tiam mi aŭdis, kiel tremas ŝia voĉo. Eĉ post dek ok jaroj da libereco mi ne sentis min tute neŭtrala pri la sorto de la eksedzo. Do mi diris:

‘Aŭ mi voku la policon, aŭ mi mem vizitu lin!’

‘Nek la unua, nek la alia!’ Ŝi malaperis.

Post kelkaj minutoj mi vokis ŝin, kaj mi aŭdis, ke ŝi ploras.

‘Mi vizitu lin!’

‘Bonege!’

Lian adreson mi skribis, kaj mi rapide foriris.

La vespera veturado per trajno kaj buso al la urbo estis malfacila kaj malrapida, kaj ekeniris mian kapon, ke mi ne bone konas la vojon. Survoje la filino multfoje telefonis kaj retelefonis al mi por demandi pri la progreso. La akumulatoro de la poŝtelefono iom post iom malfortiĝis. Iom post iom mi mem iĝis histeria, do mi silentigis ŝin. Atingante la urbon mi vane klopodis trovi taksion. Kie estas la taksioj, kiam oni bezonas ilin? Finfine mi sukcesis, sed ho ve, ŝajnis al mi, ke la ŝoforo ne kapablas mem trovi la straton. Tiam la filino revokis min:

‘Paĉjo fartas bone! Li simple forgesis ŝalti la poŝtelefonon. Hejmeniru panjo!’

Mi petis al la ŝoforo, ke li haltu. Mi pagis lin kaj mi hejmen revenis sola, kaj tie troviĝis kiel kutime neniu zorgema aŭskultanto.”

„Ĉu vere? Ĉu mi nun rajtas daŭrigi mian rakonteton?” Daŭre ŝi blekadis:

„Mi sentas min terure soleca. Ĉu vi ne komprenas?”

Ho jes, Karulino Kanibalino, mi finfine komprenas!

Betty CHATTERJEE

ANONCETOJ

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tut-taga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.inter-nacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Esperantistaj foto- kaj filmamatoroj, vizitu www.ipernity.com/?lg=eo. Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR
30 USD
aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

REGULAJ KUNLABORANTOJ: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp
lkk@free.fr

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj


retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto

La jaro 2008

Via poŝamiko dum la tuta jaro 2008 (kaj pli)



Poŝkalendaro

- kun spaco por fari notojn,
- kun indiko de la festotagoj en diversaj landoj

Enciklopedieto

- kun la ŝtatoj de l' mondo,
- kun ĉefurboj, loĝantoj, surfaco ktp ktp,
- kun indiko kiel telefoni el kaj al eksterlando
- kun radioprogramoj en Esperanto
- kaj multe pli

Mendu ĝin tuj

ĉe Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140,
B-2000, Antwerpen, Belgio
retbutiko@fel.esperanto.be
aŭ ĉe via Monato-peranto
(vidu liston kaj prezojn en p. 4).

Certiĝu pri ĝustatempa livero, kaj mendu jam nun por la 3 venontaj jaroj (5 % da rabato) aŭ por la 5 venontaj jaroj (10 % da rabato!).